

# Esperanto aktuell

38. Jahr (2019) №4 (256)

# 256



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



- Matthias Hecking dum GEK en Neumünster
- TORPEDO 14 en oktobro 2019 – Kio estos tio? ● Solena inaŭguro de la Esperanto-pavilono ● Transponta Esperanto-Kongreso germana-pola-fervojista ● Esperantomuzeo en Vieno festas sian 90-jaran jubileon
- En la UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj ● Kiam ni festu la 100-an GEK?

## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

[www.esperanto.de/deb](http://www.esperanto.de/deb) (Netzpräsenz)

**Bankkonto** (por membrokotizoj kaj donacoj)  
**/ Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB,  
Sparkasse Odenwaldkreis,  
DE 3250 8519 5200 4011 4571.  
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

## Oficejo / Geschäftsstelle:

### Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,  
Leitung: **Sibylle Bauer**  
030 / 5106 2935, 0800 336 3636  
Fax: 030 / 4193 5413  
[sibylle.bauer@esperanto.de](mailto:sibylle.bauer@esperanto.de)

### Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

## Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / **retmesaĝo al** [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form [vorname.name@esperanto.de](mailto:vorname.name@esperanto.de).

### Prezidanto / Vorsitzender

**Ulrich Brandenburg**, Durchwahl: -5111  
[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)

### Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

**Andreas Emmerich**, Durchwahl: -5112

### Trezoristo / Kassenwart

**D-ro Matthias Hecking**, Durchwahl: -5113

### Sekretario / Schriftführer

**Nils Brinkmann**, Durchwahl: -5125

### Landaj ligoj / Landesverbände

**Wolfgang Bohr**, Durchwahl: -5114

### Administrado / Verwaltung

**Barbara Brandenburg**

### Publika agado kaj pliklerigado /

### Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

**Oliver Waltz**, Durchwahl: -5116

### Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und Treffen

**Andreas Diemel**, Durchwahl: -5120

### IT-aferoj (teknikaj) /

### Informationstechnologien

**Franz Kruse**, Durchwahl: -5119

### Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

**Michaela Stegmaier**, Durchwahl: -5118

### Germana Esperanto-Junularo /

## Deutsche Esperanto-Jugend

**Michaela Stegmaier**, Durchwahl: -5211

[gej.prezidanto@esperanto.de](mailto:gej.prezidanto@esperanto.de)

### Komisiitoj / Beauftragte

[esperanto.de/deb/beauftragte](http://esperanto.de/deb/beauftragte)

### Verantwortliche für Presse- und Öffentlichkeitsarbeit

**Louis von Wunsch-Rolshoven**,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)

**D-ro/Dr. Rainer Kurz**, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

[rainer.kurz@esperanto.de](mailto:rainer.kurz@esperanto.de)

### Komisiito por rondvojaĝoj / Verantwortlicher

**für Rundreisen**, Durchwahl -5123

**Uli Ender**, [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)

### Medienecho

**Hermann Kroppenber**, Durchwahl: -5121

[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

### Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,

Durchwahl: -5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de),

[www.esperanto.de/buchversand](http://www.esperanto.de/buchversand)

### Komisiito Interreta Redaktado /

### Beauftragter Internetredaktion

**Thomas Bormann**, Durchwahl: -5117

[thomas.bormann@esperanto.de](mailto:thomas.bormann@esperanto.de)

### Pliaj adresoj / Weitere Adressen

### Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

### Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)

### Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

### Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj

kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,

die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)

1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

[ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)

### Germana Esperanto-Instituto /

### Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de),

[www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)

### Germana Esperanto-Biblioteko /

### Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

[biblioteko@esperanto-aalen.de](mailto:biblioteko@esperanto-aalen.de)

[bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de)

[www.esperanto.de/bibliothek](http://www.esperanto.de/bibliothek)

### Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

**Andreas Emmerich**, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)

(nur por FAME)

### Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart

eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

## Aŭstria Esperanto-Federacio /

## Österreichischer Esperanto-Verband

[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

## Aŭstria Esperanto-Junularo /

## Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), <http://aef.esperanto.at>

## Esperantomuzeo Viena /

## Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz

1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@](mailto:plansprachen@onb.ac.at)

[onb.ac.at](mailto:onb.ac.at), [www](http://www.onb.ac.at).

[onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

## UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

## beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

## Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

## Aŭstrio / Österreich

**Leopold Patek**, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel.

+43/66473611289,

[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

## Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

## Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

## Redaktista teamo / Redaktion:

**Stano Marček** (Martin/Slovakio),

**Yashovardhan Singh**, Im Johannistal 23,

42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

## Kunlaborantoj / feste Beiträger:

**Hermann Kroppenber** (Medienecho),

**Utho Maier** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

## Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuel* kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

*Esperanto aktuel* mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

## Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

## Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc

a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2019/3 ĝis

la 15-a de majo 2019. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format \*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de),

für Nr. 2019/3 bis zum 15. Maj 2019.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).



## Karaj legantoj,

pasis la 96-a Germana Esperanto-Kongreso en Neumünster (niaj specialistoj eltrovis ke ĝi fakte jam estis la 97-a). Partoprenis ĉirkaŭ 130 personoj, inter ili multaj eksterlandaj gastoj. 77 membroj de GEA ĉeestis la jarĉefkunvenon. La kongresa temo „indigenaj lingvoj“ konvene al la UNESKO-jaro 2019 vekis intereson. Sufiĉe vaste en la germanaj amasmedioj distribuiĝis artikolo de DPA. Salutmesaĝoj atingis nin ne nur de la ministroprezidanto kaj la gvidantoj de la urbo, sed ankaŭ de asocioj kaj institutoj reprezentantaj la aŭtoktonajn minoritatojn en Germanio. Skribis eĉ la komisiito de la Federacia Registaro respondeca pri tiu fako. Kaj kelkaj interesitaj neesperantistoj ĉeestis la malferman sesion. La programo de la kongreso adekvate kovris la temon. Estas konate ke inter esperantistoj troviĝas ne malmultaj specialistoj pri minoritataj lingvoj. Tre bone efikis la prelegoj de prof-o Eduard Werner pri la sorabaj lingvoj, de d-ro Seán Ó Riain pri la irlanda, de Nicole Margot kaj Jean-Marc Leclercq (JoMo) pri la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) kaj pri la okcitana kaj la provencfranka lingvoj. Pri lingvaj temoj ni kapablas serioze kundiskuti. La kontaktojn kun niaj “naturaj aliancanoj” tial indas konservi ankaŭ post fino de la jaro de la indigenaj lingvoj. Kongreso tamen havas ne nur fakan programon. Gravaj por la etoso estis ankaŭ aliaj eventoj: la konatiĝo kun esperantista aŭtoro de krimromanoj (d-ro Thorsten Sueße el Hannover, kun kiu ni organizis publikan libroprezenton), la koncerto de loka knabina muzikgrupo - kaj JoMo, kiu ĉiam denove impresas per sia entuziasmiga repertuaro. Tre taŭga

estis la kongresejo “kiek in”, kie multaj el ni ankaŭ povis favorpreze loĝi.

Kelkaj novaĵoj el la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio. La ĝisnuna estraro reelektiĝis kun du ŝanĝoj: Julia Noe post kvar jaroj forlasis la estraron pro profesiaj kialoj. Ŝi jam dum multaj jaroj aktivis en la Esperanto-movado (kaj promesis resti aktiva ankaŭ nun). Por GEA ŝi ĉefe prizorgis la enhavon de nia retpaĝo - do tion, kion oni hodiaŭ unue trovas serĉante ion pri Esperanto. Koran dankon al ŝi pro la multa, ofte nokta kaj ĉiam fidinda laboro. Kaj revenu, kiam la profesia ŝarĝo tion permesos al vi! Kiel sekretario nove eniris la estraron Nils Brinkmann. Lin multaj el vi konas kiel iaman estraron de GEJ kaj kunorganizanton de Internaciaj Seminarioj. Mi tre ĝojas ke li pretis reaktiviĝi, kaj krome estas granda helpo denove havi sekretarion en la estraro. Gravan funkcion ekster la estraro transprenis Thomas Bormann, alia konato el la junulara medio kaj nun redaktoro ĉe SWR. Kiel komisiito li estonte okupiĝos pri la redaktado de nia retpaĝo, pri kies teknika funkciado kaj ĝisdatigo daŭre zorgas Franz Kruse. Ankaŭ en Neumünster ni denove elektis honoran membron de GEA. Tiun distingon ĉijare ricevis Albrecht Kronenberger, konata al multaj el ni ĉefe pro sia multjara aktivado en la kristana Esperanto-movado.

La kalendaro estas plena da Esperanto-eventoj ĝuste dum la somera sezono: rigardu la liston aliloke en ĉi tiu eldono. Sed ankaŭ por GEA post la kongreso estas antaŭ la kongreso. En 2020 (de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio) ni kunvenos kune kun la pola partnera asocio PEA kaj la fervojistoj (IFEJ) en Frankfurt (Oder) kaj Slubice. Fariĝos vere transponta kongreso: la partoprenantoj loĝos, kunvenos kaj ekskursos ambaŭflanke de la rivero en tiu duobla urbo, kiu hodiaŭ fariĝis simbolo por translima kunlaboro. Por la kongreso ni elektis la temon „najbaroj“: sufiĉe trafan, sed lasantan multajn eblecojn por kunmeti bonan programon. Tio okupos nin dum la venontaj monatoj. Ideoj kaj proponoj estas ĉiam bonvenaj! Belan ferian sezonon deziras al vi

Ulrich Brandenburg

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Matthias Hecking, vicprezidanto de Esperanto Rejnlando-Palatinato, dum GEK

**2:** Adresoj

**3:** Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj! Enhavtabelo.

**4-6:** Interkultura Centro Herzberg:

Internationale Radfahrerwoche per Esperanto. TORPEDO 14 en oktobro 2019 (03.- 06.10.2019) – Kio estos tio? Termine. Esperanto-Centro Herzberg disponigas BEMI-migradpremion. Someraj eventoj. Solena inaŭguro de la Esperanto-pavilono

**7-10:** Germana Esperanto-Asocio:

Transponta Esperanto-Kongreso germana-pola-fervojista. Unua informilo

**11-14:** Aŭstria Esperanto-Federacio:

Esperantomuzeo en Vieno festas sian 90-jaran jubileon. La hierarkio de la EU-lingvoj. Josef Kavka (1922-2019). Lingva kafejo en Bratislavo. Meso en Esperanto. Renkontiĝoj en Weltmuseum

**15-19:** Germana Esperanto-Asocio: En

la UNESKO-jaro de indigenaj lingvoj. Nils Brinkmann. Germana Esperanto-Kongreso: kiam ni festu la 100-an GEK?

**20-21:** Medienecho.

**22-23:** Kalendaro. 120-a naskiĝtago de la verkisto kaj esperantisto Michl Ehbauer

**24-25:** El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 47 – Esperanto aktuell, ĉu ĝi ne ankaŭ estu io por via urbobiblioteko? Esperanto aktuell, wäre das nicht auch etwas für Ihre Stadtbücherei?

Folge 48 – Nachruf Helga Czirn-Terpitz \*1929-2019\* (vormals Helga Windisch)

**26:** El la landaj ligoj: Esperanto-koncerto en hotelo "Zum Pass" en Herzberg-Siebert. Ĉasisto de sonĝoj

**27-30:** ~~kune~~ – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Printempa Esperanto-Kunveno (PEKO) okazis la unuan fojon en Germanio. 25. KEKSO in Neumünster. Evangeliaj Tagoj en Dortmund. Julia Pasko

**31:** Germana Esperanto-Asocio:

Aliĝilo al Pola-Germana kongreso 2020 en Frankfurt (Oder)/ Slubice

**32:** Bonvenon al la 72-1 IFEF-Kongreso en Germanio. Fotoj de Liba kaj Floreal Gabalda.

# Internationale Radfahrerwoche per Esperanto

In Herzberg, der Esperanto-Stadt, begegnen sich verschiedene Freizeit- und Interessengruppen.

Für mehr als eine Woche trafen sich zum ersten Male leidenschaftliche Radfahrer aus Deutschland, Belgien, den Niederlanden und aus Russland zu einem internationalen Treffen. Von Herzberg aus wurden gemeinsame Ausflüge unternommen, z.B. nach Ebergötzen mit dem Besuch des Brotmuseums und der historischen Wilhelm-Busch-Mühle, ins nahe Eichsfeld mit Duderstadt, beim Sonnenaufgang Abfahrt zum Brocken und nachmittags zurück nach Herzberg, in das Klosterdorf Walkenried, in das Radfahrermuseum in Einbeck. Natürlich kam auch Herzberg mit den vielen Sehenswürdigkeiten, z.B. ein Besuch des Museums im Welfenschloss und Baden im nahen Juessee nicht zu kurz. Es gab mit Herzberger Esperanto-Sprechern Grillfeste und heitere Begegnungen. Eddy aus Belgien hielt einen amüsanten und bilderreichen Vortrag "Räder und Kunst" mit vielen witzigen Fotos zu diesem Thema. Seit vielen Jahren hatte er in etlichen Ländern entsprechende Fotoobjekte gesammelt. Oft wurde selbst gekocht und viel diskutiert. Dabei stand das geliebte Rad mit vielen einmaligen Ausflugszielen im Mittelpunkt.

Im großen Herzberger Facharchiv des Esperanto-Centros konnten auch historische Fotos gefunden werden, wonach schon vor ca. über 100 Jahren etliche Esperantofreunde gern mit dem Rad unterwegs waren.



Gruppenfoto mit verschiedenartigen Rädern im Garten des Herzberger Esperanto-Zentrums.

Das Esperanto-Centro in Herzberg spendierte der esperantosprachigen Radfahrergruppierung BEMI einen tollen Wanderpreis, nämlich ein künstlerische Radgestaltung aus Bronze.

## TORPEDO 14 en oktobro 2019 (03.- 06.10.2019) – Kio estos tio?



Foto el la antaŭa TORPEDO 13: unu el la ĉeftemoj estis tradukado. Pri tiu temo prelegis la invitita prelegantino Anina Stecay, kies prezentadon ni eĉ filmis por estonta uzo en la ellaborata interreta klerigsistemo.

**Asocio de Germana Esperanto-Instruistoj (AGEI) kaj GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg am Harz jam dum pli ol dek jaroj komune organizas elstarajn klerigseminariojn.**

Tute egale, ĉu vi volas regule partopreni la seminariojn de GEA-Filio aŭ nur unuope, ni ofertas unikajn klerigbonŝancojn por vi. Nepre notu la daton kaj bonvolu baldaŭ aliĝi. Prelegos i.a. profesorino Ilona Koutny el Poznano, d-ro Johannes Mueller, Eva Fitzelová, Zsófia Kóródy, Martin Ptasinski kaj Petro Zilvar.

Bonvolu peti la detalan programon kun aliĝilo ĉe [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de). Volonte ni peros por vi favorprezajn tranoktejojn. Kompreneble vi povos plilongigi vian restadon, resp. staĝadon.

**TORPEDO 14:** Pedagogiaj Tagoj (AGEI, GEA), prelegoj, prezentadoj, spertinterŝanĝo pri instruado de Esperanto. La 86-a GEA-Studsessio, modulo pri metodiko, didaktiko, instrukapabligo.

## Termine

**Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6,  
DE-37412 Herzberg am Harz – die Esperanto-  
Stadt. Tel. 05521-5983. E-Mail: [esperanto-  
zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de). Stato: 14.07.2019.**

**Mittwochs ab 16:30 h Esperanto-  
Klub per LEB** (evtl. Kursus, interessante  
Übersetzungstexte, div. Themen, Unterhaltung,  
Informationen, Gäste, Lieder), ICH (im Sommer im  
Esperanto-Garten / Esperanto-pavilono).

**Se vi volas kunkonstrui aŭ subteni nian laboradon (ebla  
interparolo en la E-pavilono), bv. kontakti Peter Zilvar!**

**B) Sonderausstellung „25 Jahre Städtepartner-  
schaft Herzberg am Harz & Góra/PL“ (gefördert durch  
„Demokratie leben!“), Museum des Welfenschlosses  
(obere Plattform) in Herzberg**

**03.08.2019 – 10.08.2019** Ferienfreizeit SALO mit Schülern  
aus den Partnerstädten Góra/PL u. Herzberg am Harz

**11.08.2019** Bahnhofsfest in Herzberg – die Esperanto-  
Stadt (E.-Informationsstand auf dem Esperanto-Platz)

**17.08.2019** (8 h – 20 h) Universo Paralela, Esperanto-  
Centro Herzberg

**29.08.2019** Nova Esperanto-Klubo en Göttingen

**05.09.2019** Sommerfest der LEB Südniedersachsen im  
Kloster Brunshausen

**14.09.2019** Esperanto-Tag EMAS (Landesverband  
Niedersachsen) in Hannover

**03.10.2019 – 06.10.2019** TORPEDO 14, AGEI / GEA-  
Weiterbildungsseminar, ICH (Bv. legi sur la apuda paĝo 4)

**18.10. – 20.10.2019** Tagung des Esperanto-  
Blindenverbandes (LIBE) in Herzberg-Sieber (schon 15  
Anmeldungen)

**Ende oktobro 2019** Neue bilaterale Sonderausstellung

**01.11.2019 – 03.11.2019** DEB-Verbandsratssitzung  
in Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt

**08.11.2019** (Fr) 19 h – 10.11.19 Esperanto-  
Wochenendkursus, ICH in Herzberg

**13.12.2019** (Fr) 19 h– 15.12.19 DEB-Weiterbildungsseminar,  
Weihnachts- & Zamenhoffeier, ICH

**15.12.2019** (So) 10 Jahre „Dr. L.L. Zamenhof-Denkmal“  
in Herzberg (Kl. Erinnerungsfest)

**10.07.20 – 26.07.20** Esperanto-Sommerkurse (SEP)  
in Herzberg

## Esperanto-Centro Herzberg disponigas BEMI-migradpremion

**Belan kulturpremion disponigis  
Esperanto-Centro Herzberg al Biciklista  
Esperanto-Movado Internacia (BEMI).**

**N**i ne vivus en la unika Esperanto-urbo, se ni ne  
konstante provus doni novajn ideojn kaj impulsojn  
por vivanta Esperanto-vivo kaj movado.

Ĝuste estis Lars Sözüer (la senlaca motoro de la biciklista  
E-movado), kiu kiel unua ricevis tiun artisman biciklistan  
migradpremion el bronzo je la fino de la Unua Internacia  
BEMI-Semajno en Herzberg - la Esperanto-urbo. Cetere  
Lars ne nur uzas ian normalan biciklon, sed ekzemple povas  
veturi longdistance per Tandemo kiel unuopulo.

Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar komune transdonis dum  
solena momento tiun vere artisman biciklistan premion. En  
la sekvaj jaroj BEMI-estraro decidis pri la plutransdono al  
novaj aktivuloj.

**Jen foto de la valora unika Esperanto-kulturkontribuaĵo:**



## Someraj eventoj

en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo  
Kursaro, gastoj, 13-jara Esperanto-urbo, nova  
Esperanto-pavilono.

**H**erzberg am Harz ne estus "la Esperanto-urbo", se ne kvazaŭ konstante okazus diversaj eventoj kaj interkulturaj agadoj.

La trian fojon en sinsekvo ni organizis somerajn Esperanto-kursojn eĉ kun partoprenantoj el Danlando, Francio, Hungario kaj Pollando.

Kelkaj jam realiĝis por la Someraj Esperanto-Perfektigaj Kursoj (SEP) en julio 2020.

Nemalmultaj gastoj vizitas nin el diversaj landoj aŭ haltas survoje al aliaj kongreslokoj kaj simile.

Preskaŭ oni ne povas kredi, ke la plej granda, multflanka kaj publika Esperanto-projekto "Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo" danke al Esperanto-Centro Herzberg jam povis festi sian dektri-jaran naskiĝtagan datrevenon.

En la Esperanto-ĝardeno de la Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg) ni konstruis stabilan pavilonon el ligno. Tiu nova ejo taŭgas dum la someraj monatoj kiel kunvenejo, ekz. por la merkreda klubo, por gastoj kaj fruktodonaj interparoladoj. Por la inaŭguro kun bonetosa ĝardenfesto aperis pli ol kvindek homoj.

Kompreneble kurento kaj retatingo servas la komforton de la uzantoj. Ni konstruas, bv. kunkonstrui kun ni!

Se vi foje volas viziti nin, bvonvolu kontakti nin.

**Petro Zilvar kaj Zsafia Korody. Bonvenon!**

**Gastoj, jen ekzemple el Britio kaj Aŭstralio,  
ĉe la granda murpentraĵo:**



Sur la foto: kun gastoj en la nova Esperanto-pavilono.

## Solena inaŭguro de la Esperanto-pavilono

Herzberg am Harz ne estus la unika "Esperanto-urbo", se ne konstante kelkaj aktivuloj realigus novajn ideojn por viviĝi nian faman Internacian Lingvon en la normala vivoĉirkaŭaĵo.

**Ĉ**e la Esperanto-Centro, resp. Interkultura Centro Herzberg (ICH) jam ekzistas flegata Esperanto-ĝardeno kun specialaj plantoj kun nomŝildoj. Dum la someraj monatoj ĝis oktobro multaj kunvenoj kaj klubhoroj okazadis en tiu konata pavilono. Tamen ĝi ne estis stabila kaj la malnova kaj longjare uzata pavilono ne plu estis uzebla. Venis la ideo akiri stabilan "Esperanto-pavilonon". La ideon sekvis baldaŭa mendo de nova pavilono el ligno. Post dufoja farbigado ni ekkonstruis ĝin kune kun helpantoj..

Ekestis bela, agrabla somera Esperanto-kunvenejo. Ni ornamis ĝin per flagetoj, ekz. kun la vorto "paco" en multaj lingvoj. Kurento, elektra lumo kaj eta fridujo estas je dispono.

La nova ejo jam servis dum BEMI-semajno, klubhoroj, kunvenoj. Al la gastoj ĝi vere plaĉas kaj utilas. Cetere ni festis la inaŭguron kun ĝardenfesto en amika rondo de kvindek partoprenantoj.

Ankaŭ vi foje estu gasto en la Esperanto-ĝardeno kaj ĝuu niajn novajn servojn!

Se vi havas iun realigeblan ideon kaj se vi volas praktike kunkonstrui kun ni, volonte ni povos tion priparoli prefere en la aktiva pavilono. Bonvenon!

# Najbaroj

---



**Transponta Esperanto-Kongreso  
germana-pola-fervojista  
Frankfurt (Oder) / Słubice  
29-a de majo ĝis 1-a de junio 2020**

---

**Unua informilo**

---

### **Komuna kongreso: tri partneroj**

Dum la pentekostaj tagoj de 2020 (29-a de majo ĝis 1-a de junio) Pola Esperanto-Asocio kune kun Germana Esperanto-Asocio okazigos komunan kongreson en la limurboj Frankfurt (Oder) kaj Słubice. Kune kun la du landaj asocioj samloke kongresos la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio. Dum la unuaj tagoj la kongreso havos komunan programon por ĉiuj tri partneroj. La fervoja kongreso tamen laŭkutime daŭros tutan semajnon. Ĝi do havos propran programon de la 1-a ĝis la 5-a de junio.

### **Kio kaj kie estas Frankfurt (Oder) kaj Słubice?**

Frankfurt apud Odro estas urbo kun hodiaŭ 58.000 enloĝantoj 79 kilometrojn oriente de Berlino ĉe la limo al Pollando. Ĝi fondiĝis en la 13-a jarcento kiel modesta setlejo en la krucpunkto de diversaj komercaj vojoj. Urbajn rajtojn ĝi ricevis en 1253. En la prusa provinco Brandenburg ĝi avancis al ĉefurbo de samnoma distrikto. Konataj frankfurtanoj estis Thomas Müntzer, gvidanto de la „kamparaj militoj“ en la 16-a jarcento, kaj la aŭtoro Heinrich von Kleist (1777-1811). En Frankfurt studis ankaŭ la famaj esploristoj kaj sciencistoj Wilhelm kaj Alexander von Humboldt. Universitata urbo ĝi fariĝis jam en 1506, sed en 1811 la „Universitato Viadrina“ devis translokiĝi al Vroclavo. La universitato refondiĝis - kiel Eŭropa Universitato Viadrina - nur en 1991 kaj rapide akiris renomon pro sia fokuso je rilatoj kun orienta Eŭropo.

Militoj decidis pri la sorto de la urbo kaj la rolo de la rivero Odro: la 30-jara milito (kiam Frankfurt perdis tri kvaronojn de siaj enloĝantoj), la 7-jara milito, la Napoleonaj militoj kaj laste la dua mondmilito, dum kies finaj bataloj la urbo detruigis, kaj sekve de kiu ĝi iĝis limurbo. El la orienta urboparto fariĝis la pola urbo Słubice. La Odro hodiaŭ markas la limon de du ŝtatoj: ambaŭ tamen membroj de la Eŭropa Unio kaj la Schengen-zono, tiel ke nun la vojo trans la ponton denove estas libera. Frankfurt kaj Słubice, sed ankaŭ la apudlimaj regionoj ambaŭflanke de la rivero hodiaŭ multfacete kunlaboras.

### **Kiel veni al Frankfurt kaj Słubice?**

Ambaŭ urboj situas ĉe la aŭtoŝoseo E30 kaj la fervoja ĉeflinio de Berlino al Poznań kaj Varsovio. Plurfoje tage internaciaj trajnoj haltas en la stacio de Frankfurt. Pli ol ĉiuhore veturas regionaj trajnoj inter Frankfurt kaj Berlino. La plej proksimaj aviadejoj estas Berlin-Tegel kaj -Schönefeld. Enurbe funkcias densa reto de bus- kaj tramlinioj. La urba buslinio 983 ligas la stacion de Frankfurt kun Słubice. Ĝi haltas tuj antaŭ la kongresejo kaj la studentaj domoj sur la pola flanko.

### **La kongresejoj**

En 2020 ni spertos verdire „transportan“ kongreson. La plej multaj programeroj okazos en Collegium Polonicum en Słubice, komuna kolegio fondita en 1992 fare de la Eŭropa Universitato Viadrina kaj la Adam-Mickiewicz-Universitato Poznań. Inaŭgurita en 1998 ĝi hodiaŭ ofertas larĝan spektron de studeblecoj. Por nia kongreso ĝi disponigas diversgrandajn kunvenejojn kaj studentan manĝejon. Pluraj restoracioj kaj vendejoj troviĝas proksime. Collegium Polonicum situas tuj apud la orienta flanko de la urba ponto: la centron de Frankfurt de tie eblas piede atingi en ne pli ol dek minutoj. Por la malferma sesio de la kongreso sabaton (30-a de majo) ni rezervis salomon de la universitato Viadrina en Frankfurt. Ankaŭ ĝi troviĝas en piedira distance de la ponto.

### **La kongresa programo**

Por translima kongreso estas nature elekti la temon „najbaroj“. Ĝin traktos prelegoj kaj diskutgrupoj. La defioj kaj ŝancoj de translima kunlaboro estas temo ne nur inter Pollando kaj Germanio, kiujn ligas intensaj ekonomiaj kaj interpersonaj rilatoj, sed ankaŭ longa - ofte malfacila - komuna historio. Prelegoj kaj ekskursprogramo ebligas konatiĝi kun la ĉirkaŭaĵo

ambaŭflanke de la rivero. IFEF-specialaĵo estas la fakprelegoj pri fervojaj temoj. Dum la kongreso okazos la statutaj kunvenoj de la organizantaj asocioj kaj pliaj fakaj kunsidoj. Ni atendas partoprenon de libroservoj kaj antaŭvidas eblecon ekspozicii en „movada foiro“. Partoprenantoj estas invitataj ĝustatempe informi pri intenco partopreni en ĝi kaj/aŭ mem kontribui al la programo.

### Provizora programo

|                               |                                                                                                                                                                            |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |
|-------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Vendredo</b><br>29.05.2020 | 14.00 – 20.00<br>19.00 – 23.00                                                                                                                                             | <i>Collegium Polonicum, Słubice</i><br><b>Alveno</b><br><b>Interkona vespero</b>                                                                                                                                                                                                                                                  |
| <b>Sabato</b><br>30.05.2020   | 10.00 – 12.00<br>12.00 – 12.30<br><br>14.00 – 16.30<br>14.00 – 16.00<br>15.00 – 15.45<br>16.00 – 18.00<br>20.00 – 23.00<br>20.00 – 23.00                                   | <i>Gräfin Dönhoff-konstruaĵo, Frankfurt (Oder)</i><br><b>Kongresa malfermo de GEA, PEA kaj IFEF</b><br><b>Komuna foto</b><br><i>Collegium Polonicum, Słubice</i><br><b>Libroservo</b><br><b>Movada Foiro</b><br><b>Prelego regiona</b><br><b>Fakprelegoj 1</b><br><b>Komuna festvespero de GEA, PEA kaj IFEF</b><br><b>Gufujo</b> |
| <b>Dimanĉo</b><br>31.05.2020  | 08.00 – 10.00<br>09.30 – 13.00<br>09.30 – 13.00<br>09.30 – 10.30<br>14.00 – 18.00<br>14.00 – 16.00<br>15.00 – 17.00<br>16.00 – 18.00<br>20.00 – 23.00<br><br>20.00 – 23.00 | <b>Diservo</b><br><b>Membrokunveno GEA</b><br><b>Membrokunveno PEA</b><br><b>Prelego Viadrina, Collegium Polonicum</b><br><b>Libroservo</b><br><b>Posttagmezaj ekskursoj</b><br><b>Paroliga kurso</b><br><b>Prelegoj diskutrondoj GEA, PEA kaj IFEF</b><br><b>Komuna muzikvespero de GEA, PEA kaj IFEF</b><br><b>Gufujo</b>       |
| <b>Lundo</b><br>01.06.2020    | 09.30 – 11.00<br>09.30 – 11.00<br>11.00 – 12.00<br>11.00 – 13.00<br><br>14.00                                                                                              | <b>Prelegoj kaj diskutrondoj GEA, PEA kaj IFEF</b><br><b>Libroservo</b><br><b>Kongresfermo GEA, PEA</b><br><b>Paroliga kurso</b><br><br><b>Daŭrigo de IFEF-Kongreso kun propra programo ĝis la 5-a de Junio 2020</b>                                                                                                              |

### La kotizoj

Por la komuna kongreso de GEA kaj PEA la kotizoj kovras la tempon de vendredo (29-a de majo) vespere ĝis lundo (1-a de junio) tagmeze. Por la kongreso de IFEF, kiu daŭros la duoblan tempon, validas propra kotizotabelo kaj aparta aliĝadreso (vd. sube).

La kotizoj aplikas la saman distingon inter A-landanoj kaj B-landanoj kiel la Universalaj Kongresoj de UEA. Membroj de la organizantaj asocioj ricevas konsiderindan rabaton; la sama rabato ankaŭ validas por kongresanoj ne loĝantaj en Pollando aŭ Germanio. Ordinara partoprenantoj pagas kotizojn laŭ kategorio I. Akompanantoj, handikapuloj, senenspezuloj kaj gejunuloj ĝis 25-jaraj pagas reduktitan kotizon (kategorio II). Ĉiuj prezoj estas indikitaj en eŭroj.

Vi trovas maldekstre la prezojn por kategorio I kaj dekstre la prezojn por kategorio II.

|                                                |            |
|------------------------------------------------|------------|
| A-landanoj: aliĝo ĝis la 31-a de decembro 2019 | € 90 / 60  |
| B-landanoj: aliĝo ĝis la 31-a de decembro 2019 | € 65 / 45  |
| A-landanoj: aliĝo ĝis la 31-a de marto 2020    | € 100 / 75 |
| B-landanoj: aliĝo ĝis la 31-a de marto 2020    | € 75 / 60  |
| A-landanoj: aliĝo poste aŭ surloke             | € 120 / 90 |
| B-landanoj: aliĝo poste aŭ surloke             | € 90 / 65  |

Unutagaj biletoj (nur surloke haveblaj)

|            |           |
|------------|-----------|
| A-landanoj | € 35 / 25 |
| B-landanoj | € 30 / 20 |

Rabatoj (ne por unutagaj biletoj):

|                                                                  |             |
|------------------------------------------------------------------|-------------|
| loĝloko en A-lando ekster Germanio aŭ ordinara membro de GEA/GEJ | € -30 / -30 |
| loĝloko en B-lando ekster Pollando aŭ ordinara membro de PEA/PEJ | € -20 / -20 |

La prezojn por la ekskursoj ni komunikos en la dua informilo.

### Kie loĝi?

Frankfurt (Oder) kaj Słubice disponas pri aro da hoteloj kaj pensionoj facile troveblaj per la reto. La komuna turisma oficejo de la du urboj (adreso: Bolfrashaus, Große Oderstraße 29, DE-15230 Frankfurt/O., retadreso [info@tourismus-ffo.de](mailto:info@tourismus-ffo.de), telefono +49 335 6100800) peras ĉambrojn ambaŭflanke de la rivero. Ĝi korespondas en la pola, germana kaj angla lingvoj. Favorpreze krome eblas loĝi en studentaj domoj sur la pola flanko ĉ. 900 metrojn for de Collegium Polonicum (ul. Pilsudskiego 14, PL 69-100 Słubice, telefono +48 61 829 6903, <http://dsslubice.amu.edu.pl>). Tie ni provizore rezervis grandan kvanton da ĉambroj. Detaloj sekvos en la dua informilo.

### Kiel aliĝi?

Paperajn aliĝilojn por la pola-germana kongreso bonvolu sendi al Deutscher Esperanto-Bund e.V., Katzbachstraße 25, DE-10965 Berlin. Reta adreso: [gek.aligho@esperanto.de](mailto:gek.aligho@esperanto.de) aŭ [gek@esperanto.de](mailto:gek@esperanto.de) (por demandoj), telefono +49 30 5106 2935 (el Germanio ankaŭ 0800 -336 3636), fakso +49 30 4193 5413. Aktualajn informojn pri la kongreso kaj formularojn por reta aliĝo vi trovos je: [www.esperanto.de/gek2020](http://www.esperanto.de/gek2020). Aliĝo validas post ricevo de la kongreskotizo. Bonvolu ĝin ĝiri kun la indiko „PGEK 2020“ kaj la nomo de la aliĝanta persono al jena konto de GEA: Deutscher Esperanto-Bund, IBAN: DE09 5085 1952 0040 1145 97 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis (BIC: HELADEF1ERB).

Por la fervojistaj kongreso (29-a de majo ĝis 5-a de junio 2020) ekzistas aparta kotizotabelo kaj propra aliĝadreso: BSW-Ortsstelle Werk Kassel, Freizeitgruppe Esperanto, Frasenweg 20-36, DE-34128 Kassel, Germanio. La kongresa retpaĝo estas <http://www.ifef.net>, la readreso por aliĝoj: [ifk.aligho@esperanto.de](mailto:ifk.aligho@esperanto.de), la kongresa konto: Andreas Diemel IFEF Ffm GEFA, IBAN: DE16 5009 0500 0000 9537 29, BIC: GENODEF1S12, pagocelo: 72-a IFK, *antaŭnomo, nomo*.

Transponta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice  
29-a de Majo - 5-a de Junio 2020



# Esperantomuzeo en Vieno festas sian 90-jaran jubileon



**Antaŭ 90 jaroj, la 1-an de aŭgusto 1929, okazis la solena inaŭguro de „Internacia Esperanto-Muzeo en Wien“. Ekde tiam oni ĉiujare informas kaj surprizas milojn da vizitantoj el la tuta mondo per la fascino de Esperanto. Dum la pasintaj kvin jaroj Esperantomuzeo bonvenigis pli ol 85.000 gastojn.**

En 1927 Felikso Zamenhof (1868-1933) donis la ideon por sistema Esperanto-dokumentado, kiam li proponis dum la 19-a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig fondi internacian Esperanto-bibliotekon okaze de la 50-jara jubileo de la lingvo en 1937. Hugo Steiner (1878-1969), entuziasma esperantisto, ĉeestis la kongreson en Danzig, transprenis la ideon, sed ne volis atendi 10 jarojn. Tial li kreis tuj post sia reveno al Vieno la asocion “Internacia Esperanto-Muzeo en Wien”, kiu estis ekde la komenco muzeo, biblioteko kaj arkivo pri Esperanto kaj planlingvoj. Pro tiu frua starigo, jam en 1927, ĝi nun estas la plej tradiciicia Esperantomuzeo kaj unu el la plej longdaŭre ekzistantaj lingvomuzeoj en la mondo.

Esencaj kialoj por tiu grava kreaĵo en Vieno estis ne nur la iniciatemo de Hugo Steiner, la relative granda disvastiĝo de Esperanto kaj ĝia publika signifo en la 1920-aj jaroj, sed ankaŭ la konkreta subteno de du aŭstriaj federaciaj kancelieroj, Johann Schöber (1874-1932) kaj Ignaz Seipel (1876-1932).

La 30-an de septembro 1928 Internacia Esperanto-Muzeo perkontrakte iĝis parto de Nacia Biblioteko, la 1-an de aŭgusto 1929 la aŭstria prezidento Wilhelm Miklas (1872-1956) solene inaŭguris la muzeon en la ĉeesto de ĉirkaŭ 600 gastoj el pli ol 30 landoj, inter ili ankaŭ Lidia Zamenhof (1904-1942), kiu faris festparoladon.

Pro la integriĝo de Esperantomuzeo en la Nacian Bibliotekon kaj pro la rapida pliampleksiĝo de la havaĵo, Vieno iĝis centro

de la internacia lingvo: 1934 okazis en la aŭstria parlamentejo la internacia konferenco “Esperanto in Schule und Praxis”, 1936 kunvenis la 28-a Universala Kongreso de Esperanto en la Viena Hofburg, kiam Esperanto-asocioj jam estis malpermesitaj en Germanio. Post la fermo de la Esperantomuzeo fare de la Gestapo en 1938 ĝi estis denove malfermita en 1947 kaj daŭrigis siajn multspecajn muzeajn, bibliotekajn kaj arkivajn servojn. Ekde 2005 Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj troviĝas en la teretaĝo de Palais Mollard en Herrengasse 9:



**Solena inaŭguro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Vieno, la 1-an de aŭgusto 1929.**

Tie ĉiuj interesitoj povas malkovri gravajn publikaĵojn, objektojn, afiŝojn, arkivaĵojn kaj interaktivajn komputilojn, kiuj impone prezentas la rimarkindan disvastiĝon kaj la multflankan aplikon de Esperanto. La permanenta ekspozicio ofertas al vizitantoj ne nur fascinan enrigardon en la plej sukcesan planlingvon, sed ankaŭ en multajn aliajn konscie kreitajn lingvojn. Precipe dum la pasintaj jardekoj multaj planlingvoj estis realigitaj por filmoj kaj televidserioj, ekzemple la Klingono el Star Trek aŭ Dothraki el Game of Thrones.



La permanenta ekspozicio en la Esperantomuzeo.

<https://radio.friendsofalan.de/hoerspiel-esperanto-von-lukas-derycke/>

**23. Juni 2019**

**Treffpunkt Europa**

**Brief an Europa: Warum Sprache mehr ist als Wörter**

Über die Vielsprachigkeit in Europa und eine gemeinsame Verkehrssprache

<https://www.treffpunkteuropa.de/warum-sprache-mehr-ist-als-worter>

**22. Juni 2019**

**Mietspiegel**

Über beliebte Sprachen für Science-Fiction

<http://mietspiegelnews.com/brechen/ubereinkommens-stellt-Game-of-Thrones-lingo-h23664.html>

**15. Juni 2019**

**UEPO – Das Übersetzungsprotal**

**Vollständiges Wörterbuch "Esperanto – Deutsch" von Prof. Erich-Dieter Krause erschienen**

**Das zweibändige Werk umfasst auf rund 1.500 Seiten**

mit etwa 150.000 Einträgen den gesamten Esperanto-Wortschatz nicht nur der Alltagssprache mit zahlreichen Wortverbindungen und Anwendungsbeispielen, sondern in relevantem Maße auch aus allen – auch neueren – Fachsprachbereichen.

<https://uepo.de/2019/06/15/vollstaendiges-woerterbuch-esperanto-deutsch-von-prof-erich-dieter-krause-erschieden/>

**14. Juni 2019**

**TAZ**

**Brief des Tages – Esperanto für die EU**

Eine Kopie zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)", Betreff: "2019\_06\_14\_TAZ\_esperanto-fuer-die-EU"

**13. Juni 2019**

**Wiener Zeitung**

**Leserforum – Eine gemeinsame Sprache für die EU**

"Bleibt das verhältnismäßig anspruchslöse Esperanto, leicht erlernbar, doch kulturell blutleer, und es gibt kaum EU-Parlamentarier, die sich dafür starkmachen würden."

Da sind doch sicher Kommentare nötig.

<https://www.wienerzeitung.at/meinung/leserforum/2013896-Leserforum.html>

**10. Juni 2019**

**Holsteinischer Courier**

**Tanzen zur Esperantomusik**

In Neumünster trafen sich 130 Zuschauer beim Konzert des Franzosen „JoMo“ im Kiek In.

<https://www.shz.de/lokales/holsteinischer-courier/tanzen-zu-esperanto-musik-id24212567.html>

**10. Juni 2019**

**Pfälzischer Merkur**

**Vereine zeigen ihre Stärke am Campus**

Der Vorsitzende des Esperanto-Clubs, Oliver Walz, wollte

die Besucher für die bekannte Kunstsprache begeistern.  
[https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/tag-der-vereine-hochschule-zweibruecken\\_aid-39348263](https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/tag-der-vereine-hochschule-zweibruecken_aid-39348263)

#### 10. Juni 2019

**schneeschnelze.wordpress.com**

**Kaufmann und Esperanto**

<https://schneeschnelze.wordpress.com/2019/06/10/kaufmann-und-esperanto/>

#### 8. Juni 2019

**esperanto.berlin**

**Im Jahr 2018 war das Jahresthema der Fachgruppe**

Esperanto „Esperanto und das europäische Kulturerbe“

<https://esperanto.berlin/wp-content/uploads/2019/05/Anlage-5.pdf>

#### 7. Juni 2019

**Hamburger Abendblatt**

**Esperanto-Kongress tagt in Neumünster**

<https://www.abendblatt.de/hamburg/article225971109/Esperanto-Kongress-tagt-in-Neumuenster.html>

#### 7. Juni 2019

**Harzkurier**

**Zsafia Korody nimmt an Konferenz für Sprachprüfer teil**

<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article225982481/Zsafia-Korody-nimmt-an-Konferenz-fuer-Sprachpruefer-teil.html>

#### 7. Juni 2019

**RTL.de**

**Esperanto-Kongress tagt in Neumünster**

<https://www.rtl.de/cms/esperanto-kongress-tagt-in-neumuenster-4352299.html>

#### 6. Juni 2019

**SHZ.de**

**Kongress in Neumünster : Eine Liebe für Esperanto**

<https://www.shz.de/regionales/schleswig-holstein/panorama/eine-liebe-fuer-esperanto-id24169812.html>



#### 4. Juni 2019

**Radio F.R.E.I.**

einstündige Sendung aus Thüringen

[https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksuubmit\\_show=sendung&kunixtime=1559638800](https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksuubmit_show=sendung&kunixtime=1559638800)

#### 2. Juni 2019

**EineWeltHaus München**

**Brasilien – Paradies auf dem Weg in die Autokratie?**

Wie in fast allen BRICS-Staaten, gibt es auch in Brasilien eine Esperanto-Bewegung mit langer Tradition und aktiven Gruppen.

<https://www.einewelthaus.de/events/brasilien-paradies-auf-dem-weg-in-die-autokratie/>

#### 29. Mai 2019

**Berliner Woche**

**Der neue Max-Josef-Metzger-Platz ist eine kleine Sportanlage**

[https://www.berliner-woche.de/wedding/c-bauen/der-neue-max-josef-metzger-platz-ist-eine-kleine-sportanlage\\_a215674](https://www.berliner-woche.de/wedding/c-bauen/der-neue-max-josef-metzger-platz-ist-eine-kleine-sportanlage_a215674)

#### 26. Mai 2019

**Süddeutsche Zeitung**

**Verständigung geht durch den Magen**

Zum Fest in Gröbenzell

<https://www.sueddeutsche.de/muenchen/fuerstenfeldbruck/integration-verstaendigung-geht-durch-den-magen-1.4463440>

#### 26. Mai 2019

**Esperanto – And The Rise of the Nazis (1/4)**

[https://www.youtube.com/watch?v=LrEm\\_wUXHKw](https://www.youtube.com/watch?v=LrEm_wUXHKw)

**Esperanto – And The Rise of the Nazis (2/4)**

<https://www.youtube.com/watch?v=NiuZRhrZp20>

**Esperanto – And The Rise of the Nazis (3/4)**

<https://esperanto.masto.host/@novajxoj/102163801160408588>

**Esperanto – And The Rise of the Nazis (4/4)**

**(Englischsprachiges Video)**

<https://esperanto.masto.host/@novajxoj/102164096793178708>



# Kalendaro

## Aŭgusto 2019

**23-26: 4-a ABELO – Apud-Berlina Esperanta LudadO** en Berlin, Germanio. Semajnfina renkontiĝo apud Berlino por ludemuloj. Kune memzorga, kun ludado ene kaj ekstere, promenado, naĝado, kafoklaĉado, muzikumado, manlaboro, loĝado en simpla natur-amika domo. Organizas: Jessica Grasso kaj aliaj. Retadreso: [abeloabeloabelo@gmail.com](mailto:abeloabeloabelo@gmail.com)

**24-31: 86-a Itala Kongreso de Esperanto** en Trieste, Italio. Temo: Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ. En la programo: plurtagaj seminarioj, prelegoj, lingvokurso, ekskursoj, vizitoj, teatraĵoj, ktp. Samtempe okazas ankaŭ Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio, EEU pri propedeŭtika valoro de Esperanto. Organizas: Triesta Esperanto-Asocio kaj Itala Esperanto-Federacio, F.E.I. Via Villorresi 38, I-20143 Milano, Italio. Retadreso: [kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it)

**28: 7-a Somera Festo sur Esperantoplaco** en Berlino, Germanio. De 15-a ĝis 18-a horo.

**30. aŭg. - 07. sept: 52-a IEF** en Łódź, Pollando. Feriado en bela apudmontara kuracurbeto kun sanigaj akvofontoj (por trinki kaj ankaŭ naĝi). Multe da verdaĵo, sed ankaŭ ĉarmaj kafejetoj. Riĉa programo turisma, kultura kaj lingvaj kursoj (kelknivelaj). Ĉiutage rondaj dancoj, gvidataj fare de spertulino. Organizas: Teresa Pomorska, ul. Świstackiego 9/21, 50-430 Wrocław, Pollando. Retadreso: [pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl)

## Septembro 2019

**07: Saksio-Anhalto-tago** en Bernburg, Germanio. Ni esploras urbon en nia federa lando Saksio-Anhalto. 10:00 h renkontiĝo antaŭ la urba informejo Lindenplatz 9, 06406 Bernburg (Saale). Ni vizitos la E-ŝtonon sur Karlsplatz kaj la kastelon. En la urbo ni certe trovos eblon por tagmanĝi. La renkontiĝo finiĝos ĉ. 15:00 h. Organizas: E-grupo Halle, Herm.-Wäschke-Str. 31, 06366 Köthen, Germanio. Retadreso: [jgersonde@gmail.com](mailto:jgersonde@gmail.com)

**13-15: Esperanto sur la strando** en Gdansk-Sopot, Pollando. Subtitolo de la aranĝo estas "Najbaroj", dediĉite al la etnaj loĝantoj de nia regiono Kaŝuby kaj Kociewie. Organizas: Triurba Esperanto-Asocio "Toronto", PL-81-824 Sopot, str. Armii Krajowej 94, Pollando. Retadreso: [torentosopot@wp.pl](mailto:torentosopot@wp.pl)

**19-22: Beneluxa Kongreso 2019** en Charleroi, Belgio. Ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj el Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio. Ĉi-foje en Valonio. Kun perfektiga kurso, varia programo kaj ekskursoj. Bonvenon! Organizas: Association pour l'espéranto. Retadreso: [doumontvalere@yahoo.fr](mailto:doumontvalere@yahoo.fr)

**20-22: 7-a renkontiĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo"** en Bjelovar, Kroatio. Tradicia aranĝo, kiu en 2019 estos dediĉita al festado de la 110-a datreveno de Esperanto en Bjelovar. Programo: interkona vespero, solena muzika kaj kultura programo, arta kaj dokumenta ekspozicioj en la Urba Muzeo, deklamkonkurso, prezento de monografio pri Esperanto kaj dokumenta filmo, prezento de novaj libroj kaj ekskurso al landa Esperanto-arkivo (Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac). Organizas: Bjelovara Esperantista Societo, Josip

Pleadin Retadreso: [esperanto.bjelovar@gmail.com](mailto:esperanto.bjelovar@gmail.com)

**20-22: 35 ARTaj KONfrontoj en ESperanto "ARKONES"** en Poznań, Pollando. Sendependa kultura kaj arta esperantista festivalo en Poznana, Pollando. Organizas: Tobiasz Kaźmierski. Retadreso: [tobiasz@esenco.org](mailto:tobiasz@esenco.org)

**21: Komuna ekskurso al Hitzacker / Elbe.** Informoj ĉe: [www.hitzacker-esperanto-hamburg.de](http://www.hitzacker-esperanto-hamburg.de)

**22: Rememoro je la poeto de origina E-poezio** en Pardubice, Ĉeĥio. Renkontiĝo okaze de 110-a jubileo de la E-klubo Pardubice kaj 100-a datreveno de forpaso de ĝia fondinto Dr. Stanislav Schulhof. Kultura programo kun la vizito al juda tombejo. Organizas: Klubo de Dr. St. Schulhof kaj AEH, CZ-530 03 Pardubice, Na Okrouhlicku 953/21, Ĉeĥio. Retadreso: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu)

**26-29: 30-a MKR, Montkabana Renkontiĝo** en Dom na Kofcah ĉe Tržič, Slovenio. La aranĝo por montmigremuloj kaj naturomuloj! Organizas: Vanja Radovanović, Paljetkova 8, HR-10110, Zagreb, Kroatio. Retadreso: [vanja.radovanovic@ericsson.com](mailto:vanja.radovanovic@ericsson.com)

**29 sep - 02 okt: Seminario pri Esperanto-mono kaj Esperanto-medaloj** en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Klerig- kaj esplorsemajno rilate al Esperanto-mono kaj Esperanto-medaloj (gravas por Esperanto-Kulturo kaj arkivoj, aparte ni organizos ekspozicion en la kastela muzeo pri tio. Organizas: Interkultura Centro Herzberg (ICH), Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Retadreso: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## Oktober 2019

**03-06: TORPEDO 2019** en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Tradicia seminario por instruado, metodiko, arkivado, klerigado ktp, kun fakprelegoj, diskutoj, organizado. Organizas: AGEI + GEA-Filio, Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Retadreso: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**02-06: 19-a KoKoLoRES** en Schwerte, Germanio. La aranĝo por ludemuloj, sed ne nur: ni ankaŭ ekskursos kaj okazigos kurson por komencantoj. Organizas: Petra Dückerhoff, Retadreso: [petra.dueckershoff@esperanto.de](mailto:petra.dueckershoff@esperanto.de)

**04-06: 16-a BIERo** en Planá, Ĉeĥio. Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo. Semajnfina aranĝo en okcidenta Bohemio. Organizas: E-mental'. Retadreso: [e-mentalprago@seznam.cz](mailto:e-mentalprago@seznam.cz)

**17-20: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio** en Brno, Ĉeĥio. Estraro de ĈEA kaj E-klubo Brno elkore invitas vin partopreni kongreson de ĈEA. La kongreso estos rememoro al unua kongreso de ĈEA, kiu okazis en marto 1969, do antaŭ 50 jaroj, ĝuste en Brno. Venu festi kun ni datrevenon de nia asocio, ni antaŭĝojas vin! Por tiuj, kiuj ne estas anoj de ĈEA, ni preparas specialan programon dum nia necesa labortraktado. Organizas: Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. Retadreso: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

**18-20: Internacia naturista naĝkonkurso** en Parizo, Francio. Unuafaje naturistaj esperantistoj povas partopreni la internacian naĝkonkurson en Parizo kaj defendi la kolorojn de Esperanto tra nia asocio INOE. La naĝkonkurso okazos la



# 120-a naskiĝtago de la verkisto kaj esperantisto Michl Ehbauer

Michl Ehbauer estis unu el la plej popularaj bavaraj verkistoj,

dialektpoetoj kaj humoristoj. Ĝis sia morto li aktivis en la munkena Esperanto-movado.

**M**ichl Ehbauer naskiĝis la 27-an de aŭgusto 1899 en Amberg (bavara distrikto Supra Palatinato). Kiel dekkvinjarulo li venis al Munkeno kaj lernis la metion de murfarbisto. Poste li laboris kiel oficisto ĉe la fervojo. Ehbauer iĝis tre serĉata oratoro ĉe karnavalaj kaj klubaj festoj, “bavaraĵ vesperoj” kaj multaj aliaj aranĝoj. Li skribis interalie multnombrajn burleskajn komediojn, amuzajn rakontetojn, skeĉojn kaj poemojn. Ĉe la bavara radiostacio li estis ŝatata parolisto kaj gvidanto tra elsendoj.

La ĉefa literatura verko de Michl Ehbauer estas „Baierische Weltgeschichte“ (Bavara mondhistorio), kiu temas pri la biblia historio de la mondo en versformo kaj bavara dialekto. Ĝi estas la plejvendita dialektverko de la germana lingvoregiono; ĝis hodiaŭ la eldonkvanto sumiĝis je pli ol tricent mil ekzempleroj. Krome li skribis “Der Faust in der Krachledern” (La Faŭsto en la leda pantalono), bavaran version de fama verko de Goethe. Li ankaŭ verkis biografion de la munkena ĉefurbestro Thomas Wimmer.

Ehbauer estis pasia esperantisto. En la jaro 1931 li iĝis membro de la munkena Esperanto-klubo kaj en 1932 li estis elektata kiel vicprezidanto. Dum multaj jaroj li ĝojigis la klubanojn per humoraj prezentadoj. Li menciis Esperanton relative ofte en siaj verkoj kaj uzis esperantajn vortojn aŭ frazojn. Nekutima aparteco estis la mikado de la germana kaj bavara lingvo kun Esperanto.

Ehbauer mortis la 1-an de decembro 1964 en Munkeno. Li estis entombigata en la okcidenta tombejo. La tombaj enskribaj tekstas: “Dio donu pacon” kaj “Ni estas esperantaj!”. Ankaŭ la munkena indekso de stratnomoj memorigas pri Ehbauer; en ĝi oni trovas la “Michl-Ehbauer-Weg”.

**Norbert Gütter,**

Esperanto-Klub München e.V.



Foto: Norbert Gütter

19-an de oktobro 2019, kaj estos parto de tritaga semajnfino kun multaj eventoj. Organizas: Thierry Spanjaard, Marseille, Francio. Retadreso: <https://www.esperanto-naturismo.org/kontaktu-nin>

**27 okt-04 nov: AŬTUNE, la Esperanto-ferioj** en Bauge, Francio. 8-a komuna feriado por infanoj, adoleskantoj, familioj, geavoj kun kursoj, koruso kaj aliaj aktivadoj. Organizas: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Bauge-en-Anjou, Francio. Retadreso: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## Novembro 2019

**01-03: Klaĉ-Kunveno Post-Somera** en Bodegraven,

Nederlando. KKPS, la "Klaĉ-Kunveno Post-Somera", okazas ĉiujare en Nederlando en semajnfino ĉirkaŭ haloveno. La oka KKPS okazos en Bodegraven, inter la grandaj urboj de Nederlando. Organizas: Nederlanda Esperanto-Junularo. Retadreso: [esperantojongeren@gmail.com](mailto:esperantojongeren@gmail.com)

**08-10: Esperanto-Wochenendkursus / semajnfina kurso** en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Esperanto-Wochenendkursus. Semajnfina Esperanto-kurso por komencantoj kaj progresintoj. Organizas: Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg /ICH), Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Retadreso: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Daŭrigo 47 – Esperanto aktuel, ĉu ĝi ne ankaŭ estu io por via urbobiblioteko?

Jam de multegaj jaroj (mi skribas tiel, ĉar mi ne certas, kiam efektive mi komence instigis la sube priskribitan iniciaton) ekzistas belega kutimo en la publika biblioteko de nia urbo Aalen, ke oni ofertas por libera uzado amason da revuoj, kiujn rajtas uzi kaj legi la interesitaj uzantoj surloke (kaj laŭ interkonsento eĉ pruntepreni al siaj hejmoj).



Maldekstre tiu angulo biblioteka.

La kestetoj kun revuoj estas ordigitaj laŭ la alfabeto kaj stokas almenaŭ unu tutan jarkolekton de la koncerna revuo, montrante samtempe, por allogi uzantojn, la plej freŝan.

Dekstre la loko de la asocia revuo *Esperanto aktuel*.

Apuda efiko estas, ke oni mem stokas tie nur unu jarkolekton. Se alvenas jam kajero de la postsekva, tiam oni forigas la jarkolekton kaj donas ĝin al la bretaro de nia Germana Esperanto-Biblioteko, kiel 2a ekzemplero.

Por klarigi tion per ekzemplo: se alvenos la kajero 39(2020)259(01), oni donos al nia kolekto la jaron 2018, por havi sufiĉan spacon por la kompleta jaro 2019 kaj la jam kolektiĝanta 2020.

Mi intence aldonis ilustraĵojn, por ke vi povu montri ilin, kaze ke vi emas mem provi instigi al via loka urba biblioteko, ke ili imitu tiun ĉi ekzemplon.

Cetere: ne estas multege kosta afero por nia asocio, ĉar oni ne vere povus ŝpari multon por la presadkosto, se necesus malpli granda kvanto de paperaj ekzempleroj.

Aldoniĝus do nur iomaj kostoj por la sendado.

Samtempe mi proponas al vi membroj legantaj, ke vi eluzu la eblecon, mendi la pdf-eldonon, paralele al la papera, ĉar tiamaniere vi ricevos kaj povos legi unu semajnon pli frue la kajerojn (mi eĉ ne rekomendas, ke oni samtempe rezignu pri la papera eldono, ĉar tiel la asocio ne povus ŝpari signifan sumon por la presejo – tio nur estus afero pripensinda, se tiel decidus granda kvanto de niaj membroj).

Kaze, ke tiuj miaj asertoj (aŭ supozoj) ne ĝustas, mi petas, ke iu el la estraro klarigu la kialojn!

**Utho Maier**


### Folge 47 – Esperanto aktuel, wäre das nicht auch etwas für Ihre Stadtbücherei?

Schon seit vielen Jahren (und das ist absichtlich vage formuliert, weil ich nicht sicher bin, wann ich die unten beschriebene Initiative begann) ist es gute Sitte in der Stadtbibliothek Aalen, dort eine Riesenanzahl Zeitschriften für das Publikum vorzuhalten, die man vorzugsweise dort lesen sollte (auf Nachfrage eventuell auch ausleihen kann, z.B. übers Wochenende).

Links ein Bild dieses Medienbereichs.

Die einzelnen Kästen sind alphabetisch sortiert und zeigen jeweils die aktuellste Ausgabe, um die Nutzer anzulocken.

Im Detailbild rechts sieht man, wie sich dort auch unsere Verbandszeitschrift *Esperanto aktuel* einreicht.



Positiver Nebeneffekt dabei ist, dass man immer nur einen kompletten Jahrgang vorhalten kann, um Platz zu sparen. Wird das erste Heft des übernächsten Jahres angeliefert, dann sondert man den vorigen Jahrgang aus; der wird jedoch nicht makuliert, sondern in den Bestand der Deutschen Esperanto-Bibliothek abgegeben, als Zweitexemplar.

Um das zu verdeutlichen: wenn also das Heft 39(2020)259(01) ankommt, erhalten wir den Jahrgang 2018; damit ist Platz für das Vorjahr 2018.

Vielleicht können die gezeigten Illustrationen dazu dienen, dass der eine oder andere damit eine ähnliche Initiative in seiner Stadt unternimmt, damit man dort diesem Beispiel folgt?

Eine minimal höhere Auflage verursacht nicht sofort wesentliche Mehrkosten. Diese entstehen nur durch den zusätzlichen Versand. So schlage ich dem geneigten Leser auch vor, die Möglichkeit zu nutzen, dass man die Zeitschrift als pdf bestellen kann, auch parallel zur Papierausgabe. So kommt man meist schon eine Woche früher in den Genuss des jeweils neuesten Hefts (ein Verzicht auf die Papierausgabe scheint nicht angezeigt aus Kostengründen, da damit nicht sehr viel bei den Druckkosten eingespart wird – anders wäre das vielleicht, falls sich eine große Zahl Mitglieder zu diesem Schritt entschliesse).

Sollten diese meine Aussagen (oder Vermutungen) falsch sein, sollte dies jemand aus dem Vorstand klarstellen!

**Utho Maier**

## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenwertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Folge 48 – Nachruf Helga Czirn-Terpitz \*1929-2019\* (vormals Helga Windisch)

**D**ie Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen trauert um eine langjährige treue und verdienstvolle Mitarbeiterin: Helga Czirn-Terpitz war seit ihrem Ruhestand Mitglied der Aalener Esperanto-Gruppe, und ihre Arbeitskraft stand unserer Bibliothek immer zuverlässig zur Verfügung, solange es ihre Kräfte noch zuließen. Im Sommer wäre sie 90 geworden.

Sie verstarb am 5. Juni 2019. Ruhe in Frieden, Helga!

Helga war zwar kein Mitglied bei GEA, aber ohne ihre Mithilfe wäre die Gründung unseres Landesverbands BAVELO im Jahre 1982 kaum denkbar gewesen. Dessen Verbandsorgan EiBW erschien bis 1991 und war Modell für das heutige Aussehen von Esperanto aktuell, zu dessen Gunsten es 1992 sein Erscheinen einstellte [vgl. auch Ea 37(2018)250(04) auf S. 25].

Man mag sich fragen, wieso mir das eine eigene Folge meiner Beiträge der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen wert war. Für mich liegt es auf der Hand, und will es gerne nochmals deutlich machen: ohne zuverlässige Mitarbeiter ist unsere Arbeit hier in Aalen nicht leistbar. Wir ersaufen in Aufgaben und müssen dauernd Prioritäten setzen, um wenigstens das Wichtigste abarbeiten zu können.

Angesichts dessen ist das nur ein bescheidenes kleines Signal an unsere Mitarbeiter, die ihre freie Zeit diesem guten Zweck aufopfern. Dafür möchte ich anlässlich diesen Nachrufs meinen nachdrücklichen Dank aussprechen!

Zur Zeit arbeiten in und für die Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen (alphabetisch):

Jürgen Bauer, Utho Maier, Julia Mul, Petra Sedlmeier, Hedwig Schaeffer, Karl Heinz Schaeffer.

**Utho Maier**

Das Foto zeigt unser Mitarbeiterteam beim Jubiläum *100 Jahre Deutsche Esperanto-Bibliothek* im Jahr 2008: Karl Heinz Schaeffer, Hedwig Schaeffer, Jürgen Bauer, Helga Czirn-Terpitz, Utho Maier (von links nach rechts).

Ne estu tristaj  
memorante min!  
Prefere rakontu pri mi  
kaj aŭdace daŭrigu rideti  
donante spacon por mi,  
inter vi, kaj en viaj pensoj,  
kiel mi havis ĝin  
ankoraŭ vivanta.

Paŝtas nin la Sinjoro gardanto.  
Li gvidas nin al akvo vivanta  
kaj vivo eterna.

Seid nicht traurig,  
wenn ihr an mich denkt!  
Erzählt lieber von mir  
und traut euch, weiter zu lächeln;  
gebt mir doch einen Platz,  
unter euch,  
und in euren Gedanken,  
wie ich ihn hatte,  
zu meinen Lebzeiten.

Uns weidet der Herr, der Hirte,  
er führt uns zu lebendigem Wasser  
und zu ewigem Leben.



# Esperanto-koncerto en hotelo "Zum Pass" en Herzberg-Siebert

Aktivulino el Pollando Małgosia Komarnicka ofertis specialan kultureventon en Interkultura Esperanto-Centro en Herzberg, kie ŝi haltis kun grupeto, veturante al Francio.

**A**ntaŭ dek jaroj ŝi staĝis en la Esperanto-Centro en Herzberg por lingva kaj movada spertiĝo. Intertempe ŝi fondis Esperanto-Kulturcentron en la pola urbo Vroclavo. En printempo 2019 ŝi petis la Esperanto-Centron por organiza helpo, ĉar ŝi planis turneon kun membroj de la t.n. Universitato de la Tria Aĝo el Vroclavo. Okazis diversaj prokrastoj, tamen en junio 2019 subite ili realigis ekskurson al Germanio kaj al Francio por prezenti sian programon en Esperanto. Aparta surprizo estis la renkontiĝo kun kelkaj esperantistoj ankaŭ el nia ĝemelurbo kaj la apero de la juna muzikgrupo "NA RAZ" el Góra en Pollando. Cetere la juna muzikgrupo estas sufiĉe konata en tuta Pollando. Ili surprizis la publikon per prezento de kelkaj modernaj muziktitoloj en bonkvalita Esperanto.

La Esperanto-Centro sukcesis varbi multajn spektantojn, kiuj ĝuis la prezentitan programon, eĉ la urbestro kundancis danke al la instiga muziko el nia ĝemelurbo Góra.

Małgosia ankaŭ informis kaj montris fotojn pri la grandurbo Vroclavo kaj pri Silezio, en Esperanto. Krome la pola grupeto regalis la aŭskultantojn per kunportitaj kaj memkuiritaj polaj specialaĵoj. Estis agrabla vespero.



## Ĉasisto de sonĝoj

En julio 2019 la eldonejo "Libera", Belgio, eldonis la novelaron "Ĉasisto de sonĝoj" de Julian Modest.

**L**a libro enhavas 27 novelojn, kiujn la aŭtoro verkis dum la lastaj du jaroj. Legante "Ĉasisto de sonĝoj" oni nerimarkeble eniras mirindan mondon, riĉan je aventuroj, emocioj, esperoj kaj amoj. La aŭtoro spertas montri kaŝitajn sentojn, fortajn dezirojn, etajn ĝojojn, bonajn agojn. La herooj ravas per siaj pasioj. Ili strebas realigi siajn celojn en la mondo, kiu estas multkolora kaj multaspekta.

Same tiu ĉi libro, kiel iam skribis William Auld, pruvas, ke: "Julian Modest estas ege sentema observanto kaj lia psikologia kompreno de la homaj sentoj kaj motivigoj estas trafa kaj profunda." **Georgi Mihalkov**



## Printempa Esperanto-Kunveno (PEKO) okazis la unuan fojon en Germanio



### Tendumado

Kontraŭ la kutimo de la lastaj jaroj, dum tiu-ĉi PEKO ĉiuj verdaj skoltaj (krom Ideal) dormis en tendoj. Por skoltaj tio estas pli aŭtentika kaj krome lasas pli da litoj por aliaj partoprenantoj de nia kongreso. Kaj tio estis necesa, ĉar ĉiuj litoj estis okupitaj. Por ni skoltaj estis ankaŭ bele esti iom apartaj por plifortigi la grupan spiriton. La starigado de la tendoj bezonas teaman kunlaboron kaj dormante kune restas tempo babili

dum la vesperoj kaj dumnokte aŭskulti la ronkadon de la aliaj. Krom belega vetero sen pluvo dum la tuta tempo unu skolto havis plendojn: Linko havis tro varman dormsakon kaj ankaŭ la grundo sub la ŝia mato estis multe tro komforta! Tio ne estas vere defia tendumado! Kroma plendo pri tio, ke mankis piano, kio malplaĉis al ni.

Dum niaj skoltaj kunvenoj ni decidis kunveni pli ofte en la reto por ne devi sopiri la aliajn skoltojn tiom

longe inter la maloftaj kunvenoj en la jaro. Krome ni ricevis de Korsako eŭropajn skoltotukojn, por montri nian internaciecon kaj ke ni subtenas la ideon de la Eŭropa Unio.

## Mangâĵoj

La skoltoj multe helpis al nia kara kuiristino Ella en la kuirejo. Ni tranĉis legomojn, lavis manĝilaron, purigis la tablojn kaj kuirejon kaj kreis bonan etoson per muziko, dancado kaj profundtemaj babiladoj pri dio kaj la mondo. Tamen foje estis bezonata la helpo de kelkaj bonvolaj partoprenantoj, al kiuj ni volas danki. Eĉ pli grandan dankon al Ella, kiu tiom pacience kaj bone planis kaj organizis la tutan mangadon bongustegan!

## Tragedioj

Sed bedaŭrinde ankaŭ ĉe la Verdaj Skoltoj ne ĉiam ĉio bone funkcias. Ni bedaŭras anonci, ke vundiĝis Ideal kaj origine vegana supo iĝis vianda. Pli granda bedaŭro estis la preskaŭa rompo de longa tradicio. De multaj PEKOj la skoltoj ĉiam malkovris groton en la ĉirkaŭaĵo de la ejo. Ĉi-foje troveblis nur iama ŝtonrompejo en la vilaĝeto. Ni iris tien pro voko de homlupoj, kiujn ni aŭdis. Tio estis eraro, ĉar ĝi mortigis ĉiujn skoltajn vilaĝanojn. Ni petas momenton de silento pro tiu tragedio.

## Fajro

Ĉiu bona skolta renkontiĝo devas havi kelkajn gravajn aferojn:

(1) skoltojn evidente (2) fajron kaj (3) kantadon.

Ni decidis kombini ĉion kaj kantis ĉe bele memfarita paska fajro. Aliĝis eĉ kelkaj (neskoltaj) partoprenantoj,



kiuj bele kunkantis. Inter alie ni kantis la skoltan himnon, aron de belaj nostalgiaj REF-kantoj kaj plurajn kanonojn.

Ankaŭ ni rostis bastonpanon kaj sukerpufajojn super la fajro. Kiom belegaj kaj plaĉaj estas vesperoj ĉe fajro!

Skoltamike salutas vin

**Linko, Garano, Agutio, Mevo, Orcino, Ideal**

## 25. KEKSO in Neumünster

Ein bisschen seltsam waren die Leute schon, aber es war auch mein zweites KEKSO und ich wusste, was ich zu erwarten hatte. Und außerdem - seltsam bin ich ja auch, ein Grund wohl, warum ich mich in Esperantujo so wohl fühle.

**A**ls ich Freitag nach einer langen Zugfahrt und zweimal verlaufen (die Straßenbeschilderung dieser Stadt lässt wirklich zu wünschen übrig, mein Orientierungssinn auch) endlich ankam, wurde ich sogleich super lieb aufgenommen. Eine Gruppe von sechs





Menschen waren wir, zu der am nächsten Morgen ein siebter hinzustoßen sollte. Den Abend begannen wir gleich mit einem Plenum, in dem vor allem eines klar wurde: wir hatten Hunger! Also wurde erst einmal gekocht und gegessen. Einen festen Plan für den Abend hatten wir so dann noch nicht, aber nach ein paar schönen Unterhaltungen wurde der Vorschlag eines Gruppenspiels - zwei Gruppen, die eine wird von der anderen zu einem Standbild geformt, das einen vorgegebenen Begriff darstellt - angebracht und angenommen, und auch wenn wir nicht so gut darin waren, haben wir doch verdammt viel gelacht.

Und auch die folgenden zwei Tage waren vollgepackt mit schönen Momenten - der Samstagmorgen ging für mich und eine weitere Anfängerin los mit einem Sprachkurs, in dem ich mich tatsächlich getraut habe, Esperanto zu sprechen (so nett Esperantist\*innen auch sind, wenn du kein bzw. wenig Esperanto kannst, können sie ganz schön gemein sein, weswegen ich persönlich die Strategie lebe, einfach niemals mit irgendwem zu reden), dann Plenum und sehr leckeres Mittagessen, mittlerweile waren wir auch vollzählig. Neben ausladenden Gesprächen über Sprache und politischen Diskussionen wurden mitgebrachte Brettspiele gespielt, wir gingen spazieren und machten Musik (zur Verfügung stand: eine Ukulele!). Und auch verschiedene WUPs (schnelle Warum-Up-Spiele, die sehr lustig und oft sehr peinlich sind) kamen nicht zu kurz, immer wieder konnte eins die KEKSO-Teilnehmer\*innen vor dem Veranstaltungsgebäude stehend beobachten, wie sie beispielsweise mehr oder weniger rhythmisch "kunikleto", "tuki tuki" und "dangen" durcheinander sagten, begleitet von merkwürdigen Gesten.

Am Sonntag Nachmittag war dann das „Kekso kaj Teo“ angesetzt, ein Programmpunkt des GEKs, in dem Teilnehmer\*innen angeboten wurde, mit uns jungen Esperantist\*innen in Kontakt zu treten - es wurde also Tee getrunken und gemeinsam Brettspiele gespielt.

Am Abend dann gab es ein Konzert, das wir gemeinsam besuchten - super schön war es, diejenigen, die tanzten wollten, tanzten! und zwischenzeitlich schlurpten wir uns aneinander fest (Schlurp! Meine Hand berührt jetzt deine Schulter. Schlurp! Ein Ellenbogen liegt auf meinem Rücken.

Schlurp! Ein Fuß saugt sich an einer Hüfte fest. Schlurp schlurp schlurp! Wir sind ein Knäuel aus menschlichem Körper und keiner kann sich mehr bewegen. Wir fallen um).

Ein bisschen belastend war nur, als wir für einen Tanz aufgefordert wurden, uns binärgeschlechtlich in Männer und Frauen getrennt gegenüberzustellen - nicht nur schließt das nicht-binäre Menschen (also Menschen, die weder ausschließlich Mann oder Frau sind) aus, es war auch einfach unnötig und von Heteronormativität geprägt. Aber trotzdem: ein sehr schöner Abend!

Am Montag hieß es dann schon Abschied nehmen, am Abend zuvor hatten wir bereits alles was möglich war aufgeräumt, jetzt wurden noch die letzten Sachen gepackt, gefegt und der Müll weggebracht, Möbel wieder an ihre Plätze gerückt.

Es war sogar möglich, dass wir alle gemeinsam Richtung Hamburg fuhren, und so Esperantujo noch ein kleines Stück mit auf den Weg nehmen konnten.

Lian Löffler



## Evangeliaj Tagoj en Dortmund

**Estis por mi la tria fojo ĉe la eklezia tago, la dua fojo varbante por Esperanto. Ĉiam plaĉas al mi la bunta mikso de homoj tie.**

**K**un la esperantobudo ni refoje amikece konkursas en la "Markt der Möglichkeiten" pri la atento de la pasantoj. Estas amuza afero, kaj la konversacio kun



la interesitoj estas tre diversaj. Foje vi ekklarigas kio estas Esperanto, foje iom instruas la lingvon aŭ kontraŭstaras antaŭjuĝojn pri Esperanto, kiujn havis la homoj (Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?, La lingvo estas ja fiaskita, ĉu ne? Ĉu ne estas la hispana?)

Fine mi pensas, ke ni kaptis multe da atento dum la tri tagoj kaj ĉe kelkaj tio ja vekis la scivolemon pri Esperanto.

Paul Würtz

## Julia Pasko

**Dum Pasko 2019 denove okazis IJF, Internacia Junulara Festivalo, en Italio, ĉi-foje en la ĉemara urbeto Viserbella apud Rimini.**

**K**iel ĉiam, oni povis ĝui bongustan italan manĝaĵon kaj ankaŭ la proksimega plaĝo (ĉirkaŭ 1 minuton piede for de la ejo) estis invitanta. Kelkaj kuraĝuloj eĉ naĝis!

Du ekskursoj portis nin al vizitindaj lokoj de la regiono: Dum la tuttaga ekskurso ni iris al la belaj urbetoj Sant'Arcangelo kaj San Leo (sur la bildoj), kaj dum la duontaga ekskurso ni eĉ povis vojaĝi al lando for de Eŭropa Unio: San Marino.

Estis iom domaĝe, ke la programo ĉi-jare ne estis tiom riĉa kaj ke ni estis pli malmultaj partoprenantoj ol dum la lastaj jaroj. Pro tio kelkfoje mankis al mi la etoso de granda, vigla Esperanto-aranĝo. Sed tamen mi ĝojis revidi geamikojn kaj ekkoni novajn personojn, viziti interesajn lokojn en meza Italio kaj pasigi Paskon ĉe la maro.

Julia B.



**Aliĝilo por la venonta GEK** (sendu al: Deutscher Esperanto-Bund e.V., Kstzbachstr. 25, DE-10965 Berlin)

Mi aliĝas al la pola-germana kongreso de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2020 en Frankfurt (Oder) / Słubice.

Nomo:

Antaŭnomo:

Kunul(in)o:

Strato, n-ro:

Kodo, urbo:

Tel./fakso:

Retadreso:

Bonvolu publikigi

- ☐ en la kongresa libro aŭ / ☐ en listo en la interreto:  
☐ mian tutan adreson ☐ nur mian nomon kaj retadreson ☐ nur mian nomon kaj urbon  
☐ nenion pri mi.

☐ Mi donacas al la kongresa kaso €

Mi ĝiris la sumon de  je la  (dato)  
al la indikita konto de GEA.

- ☐ Mi pretas kontribui al la programo (vd. ĉe aldonaj informoj)  
☐ Mi ofertas prelegon (temon vd. ĉe aldonaj informoj)  
☐ Mi prezentos ion en la movada foriro kaj bezonos tablon (klarigu sube)

- ☐ Mi estas membro de GEA/GEJ  
☐ Mi estas membro de PEA/PEJ

Aldonaj informoj (kontribuo, temo, stando ktp.):

Dato:  Subskribo:



**BONVENON al la 72-a IFEF-KONGRESO en GERMANIO**

**29.5. - 5.6. 2020**

